

esperanto aktuala



Saluton Kara Legantaro !

Jen nova starto !

Samy kaj mi ricevis la taskon daŭrigi la eldonon de AKTUALA.

Ĉiuj ni kore dankas Paulo Branco, nia redaktinto, kiu bone zorgis pri Aktuala dum la lastaj jaroj.

Fariĝi redaktoroj estas por ni tutnova sperto. Tamen, ne forgesu ke eblas aldoni viajn artikolojn, raportojn, fotojn, ktp ... Aktuala estas ankaŭ via revuo !

Kiel fari ? Tutsimple, uzu la retadreson :

aktuala@esperantobruselo.org

En 2012, ni esperas renkonti vin multnombraj por partopreni kunvenojn, prelegojn, kantatelieretojn kaj tabulludojn ĉe EBGa kunvenejo, ... aŭ okaze de iu Esperanto-Kafejo, aŭ aliaj renkontiĝoj en Esperantio. Ankaŭ 2012 estas grava jaro por Esperanto : la 125a datreveno de la «unua libro» ! Lasttempe, ni multe renkontis viglajn esperantistojn ... ĉien ni iris ! Tio ĝojigis nin kaj instigas nin aktiviĝi por nia lingvo.



2012 aŭguras malfacile (eŭfemismo!) pro la diversaj krizoj, ktp ... Ni tre konscias pri tio kio koncernas nin ĉiuj. Ni viglatentu kaj ricevos viajn reagojn, proponoj, ...

Ne hezitu : skribu pri socio, ekonomio, vojaĝoj, ludoj, muziko, ktp... Ni profitu la okazon por kune pripensi, proponi agadojn, ludojn, ... Tiel ni havos la eblecon renkontiĝi, amuziĝi, serioze diskuti, ktp ...

Ĉiaokaze, ni feliĉos interkonatiĝi, kaj ankaŭ ..

Ni elkore deziras al vi Bonegan kaj Ĝojan jaron 2012 !

Laur'

Enhavo :

Paĝo 3 : Eventoj

Paĝo 4 : Instrua Rakonto

Paĝo 6 : La unua libro

Paĝo 7 : Lech Wałęsa ĉe JES

Paĝo 9 : La esperantisto de la jaro

Paĝo 10 : La alia Paĝo

Paĝoj 11 - 12 : Fotoj



36a ELDONJARO.

Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la N° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro : Laurent kaj Samy Loisse aktuala@esperantobruselo.org ; Prezidanto : Angelos Tsirimokos ; Kasisto : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com

Abona membriĝo : 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 ; sekretario : Laurent Loisse.

Kunvenloko : rue van Maerlant, N°2 - cxiumerkrede 18h30-20h00 - Metroo Maelbeek (tie nek poŝtkesto nek telefono.

Informoj : www.esperantobruselo.org

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

Ni estas ne danĝeraj, sed en danĝero



**Eventoj kaj agadoj franclingve
pri ciganoj, romaoj, ...
en Bruselo (Saint-Gilles)
en Januaro, Februaro kaj Marto**



Informoj : www.romstsiganesgitans.be aŭ www.lamaisondulivre.be

Ĉu vi deziras kune partopreni : spekti prelego(j)n, spektaklo(j)n, ktp ... ?
(franclingve, kaj poste, esperante inter ni ;-))

Se jes, bonvolu skribi al aktuala@esperantobruselo.org !

Agendo

Februaro 2012

- 1 Heidi pri Indonezio
- 8 Semajna kunveno
- 15 Ludoj
- 22 Semajna kunveno
- 29 Semajna kunveno

Marto 2012

- 7 Ludoj
- 14 Semajna Kunveno
- 21 Semajna Kunveno
- 28 Semajna Kunveno

Fora Informo : En Brazilo, la 15an de Decembro, la ponto Rio-Niterojo anoncis per elektronikaj paneloj la zamenhofan tagon



Instrua Rakonto

(El teksto verkita de Machado de Assis.)

Iam estis **kudrilo**, kiu diris al **fadeno**:

— Kial vi havas tiun **mienon**, tute **fiera**, por ŝajngi, ke vi ion valoras en tiu ĉi mondo?

— Lasu min.

— Ĉu mi lasu vin? Kial mi lasu vin? Ĉar mi diras, ke vi havas fian mienon? Mi ripetas, ke vi havas, kaj mi parolos ĉiam, kiam ĝi venos en mian kapon.

— Kiun kapon? Vi ne estas **pinglo**, vi estas kudrilo. Kudrilo ne havas kapon.

Kial gravas al vi mia mieno? Ĉiu el ni havas la mienon, kiun Dio donis. Zorgu pri via vivo kaj ne zorgu pri la vivo de aliuloj.

— Sed vi estas fiera.

— Certe mi estas.

— Sed kial?

— Ridinda demando! Ĉar mi kudras. La vestojn de nia mastrino kiu kudras krom mi?

— Vi? Jen io pli ridinda. Ĉu vi kudras ilin? Ĉu vi ne scias, ke ilin kudras ja mi, sole nur mi?


— Vi sole nur faras truojn en la **ŝtofon**; ja mi kudras, ligas unu pecon al alia...

— Jes, sed kion ĝi valoras? Ja mi tra-truas la ŝtofon, iras antaŭen, tirante vin, kiu venas post mi, obeante miajn ordonojn...

— Ankaŭ gardistoj iras antaŭ la reĝo.

— Ĉu vi estas reĝo?

— Ne tion mi diras. Sed la vero estas, ke vi nur montras la vojon. Mi estas tiu, kiu ligas kaj kunigas...



Tiel ili diskutadis, kiam alvenis la kudristino. Ŝi prenis la ŝtofon, prenis la kudrilon, prenis la fadenon, enigis la fadenon en la kudrilon, kaj ekkudris. La fadeno kaj kudrilo iradis kune, tra la ŝtofo. Kaj la kudrilo diris:

— Nu, fadeno, ĉu vi ankoraŭ diskutas? Ĉu vi ne rimarkas, ke tiu ĉi grava kudristino zorgas nur pri mi? Ja mi iras inter ŝiaj fingroj, ligita al ili, truante supren kaj malsupren.

La fadeno nenion respondis; ĝi nur iradis. Ĉiun truan malfermitan de la kudrilo tuj plenigis la fadeno, silenta kaj laborema. La kudrilo konstatis, ke ĝi ne respondas, kaj ankaŭ eksilentis kaj plu iradis. Regis silento en la kudro-ĉambreto; nenion oni aŭdis krom la brueton de la kudrilo eniranta la ŝtofon. Je suno-subiro, la kudristino **faldis** la kudraĵon por la venonta tago; ŝi daŭrigis la taskon dum tiu tago kaj la sekvanta, ĝis ŝi finis en la kvara tago kaj atendis la dancon.

Alvenis la danc-vespero, kaj la mastrino vestis sin. La kudristino, kiu helpis ŝin vesti sin, portis la kudrilon, por fari ian bezonatan riparon. Kaj dum ŝi aranĝis la robon, la fadeno, por moki la kudrilon, demandis ĝin:

— Nu, nu, respondu al mi, kiu iros al la danco, sur la korpo de la mastrino, parto-prenante ŝian robon kaj belecon? Kiu dancos kun gravaj viroj, dum vi reiros en la kudro-skatolon? Nu, diru.

Ŝajnas, ke la kudrilo diris nenion; sed pinglo, kun vasta kapo kaj ne malpli vasta sperto, diris al la kompatinda kudrilo :

— Nu, lernu, malsaĝa. Vi penis malfermi la vojon por ĝi, kaj ja ĝi iras amuziĝi, dum vi restas en la kudro-skatolo. Agu same kiel mi, mi malfermas vojon al neniu. Kien oni en-pikas min, tie mi restas.

Mi rakontis ĉi tiun historion al instruisto pri maĝojo, kiu diris: — Ankaŭ mi ofte laboras kiel kudrilo por multaj aĉaj fadenoj!



Joaquim Maria Machado de Assis (1839–1908)

naskiĝis kaj vivis en Brazilo. Li skribis tre gravajn verkojn, inter-alie multajn rakontojn. Lia skrib-maniero estas ĉiam plaĉa, sed ofte **ironia**.

Adaptita de **Franco Wechsler** – Brazilo.
Emilio Cid voĉlegis

La aktuala Recepto

Taĵino de kokidaĵo kun terpiroj

Ingrediencoj por 4 personoj :

- 1 farma kokidaĵo (+/- 1,500 kg)
- 1 cepo maldike tranĉita
- 1 kulereto da butero
- 8 cl da arakida oleo
- 2 ajloj hakitaj
- 1 buketo da koriandro
- ½ kulereto da safrano
- 1 cm da ĵusraspita zingibro
- ½ kulereto da pipro
- 1 kulereto da salo
- 700 g da terpiroj
- Suko freŝa el duona citrono
- 50 cl da akvo



Terpiroj aŭ tubera helianto

Preparado :

1. Tranĉu la kokidaĵon en kvar pecojn. En granda kuirpoto kun miksaĵo de butero kaj oleo substu ĝin kun la cepo kaj ajlo dum 8 minutoj sur mezgrada fajro. Aldonu spicojn, hakitan koriandron kaj akvon. Kovru kaj lasu boli dum pli-malpli 30 min.
2. Senŝeligu la terpirojn, tranĉu ilin samgrande.
3. Kiam la kokidaĵo estas preta, elprenu kaj gardu ĝin varme. Metu la terpirojn en la saŭcon kaj kuiru dum 10 aŭ 15 min. Priverŝu la legomojn per la citronosuko.
4. Por servi, metu la kokidaĵon unue en servpladon, kaj poste almetu la terpirojn kaj saŭcon. Ornamu per tranĉaĵoj el citrono kaj pecetoj el freŝa koriandro.


Tiu plado manĝiĝas kun pano.

Bonan Apetiton!

Unua Libro

"**Unua Libro**" estas konvencia nomo de la unua lernolibro de Lingvo Internacia, nuntempe nomata **Esperanto**. Ĝin verkis **L. L. Zamenhof** sub la **kaŝnomo** D-ro Esperanto. La libro havas la indikon, ke la cara cenzuro aprobis ĝin la 21-an de majo de 1887 (laŭ la rusa Julia kalendaro, t.e. la 2-an de junio laŭ la Gregoria). La dua aprobo de la rusa cenzuro kun la permeso de disvastigo post la presado, portas la daton de la **26-a de julio** (laŭ gregoria kalendaro; **14-a de julio** laŭ la rusa Julia kalendaro); tiun daton oni ĝenerale konsideras kiel aperdaton. Ĝi estas festata kiel naskiĝtago de Esperanto.

La originala nomo de la verko, en la rusa lingvo, estas "Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ." (Mejdunarodnij jazik. Predislovie i polnij učebnik., Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro.), sed en priskriboj de la historio de Esperanto oni kutime nomas ĝin Unua Libro. Al la naskiĝo de tiu kromnomo certe kontribuis posta verko efektive titolita **Dua Libro** de l' Lingvo Internacia (1888). Oni uzas la nomon Unua Libro por ĉiuj lingvoversioj kaj ĉiuj eldonoj de la verko. Laŭbezone, precipe se temas pri alia versio ol la originalo rusa de julio 1887, oni precizigu, ekz. "la germana Unua Libro", "la dua eldono de la rusa Unua libro".



Unua libro (Maldekstren : Rusa eldono, Dekstren : Pola eldono)

Eldonoj en diversaj lingvoj

La originala eldono estis nur **ruslingva**, sed antaŭ la fino de 1887 la libro aperis ankaŭ en la **pola**, **germana** kaj **franca** lingvoj kaj duaeldone en la rusa. La unua **angla** versio aperis en 1888, fuŝe tradukita, kaj laŭrakonte Zamenhof mem haltigis ĝian vendadon, kiam **Richard H. Geoghegan**, **irlandano** loĝanta en **Britio**, retradukis la libron.

Antaŭ la fino de **1888**, la "**Dua Libro**" kaj la "Aldono al la Dua Libro" eldoniĝis. En 1889 la Unua Libro estis tradukita en la **hebrean**.

Enhavo

La libro konsistas el 40 paĝoj, kovrilo kaj granda folio. Ĝia enhavo konsistas el :

- Antaŭparolo (28 paĝoj), en kiu estis la unuaj Esperanto-tekstoj:

Patro Nia, preĝo el la **Biblio**

Letero, modelo de korespondaĵo

Mia penso, originala poeziaĵo

El Heine', poeziaĵo de **Heinrich Heine**,

tradukita el la germana

Ho, mia kor', originala poeziaĵo

- Promeso, ok samtitolaj slipetoj por subskribi kaj tiel promesi ellerni la lingvon, se dek milionoj da personoj donis publike la saman promeson

- Plena lernolibro de la Internacia Lingvo, 6-paĝa, konsistanta el prezento de la **alfabeto** kaj **dek ses gramatikaj reguloj**;

- Internacia-rusa vortaro (sur aparta folio) kun jena enkonduka frazo (ruse): "Ĉion, kio estas skribita en la internacia lingvo, oni povas kompreni per helpo de tiu ĉi vortaro".

Praaj formoj

La unua eldono de la rusa "Unua Libro" entenas vortojn, restojn de antaŭaj Zamenhofaj provoj aŭ pro skriberaro, kun formo alia ol en la sekvaj eldonoj franca, pola, dua rusa, ktp.: speri (espero), vinki (venki). Aliaj radikoj havas (aŭ ŝajnas havi pro okaza erareto de Zamenhof) sencon nun ne uzatan: erari (ankaŭ tradukita: 'vagi'), militi (tradukita per sama vorto kiel 'batali'), forko (ankaŭ: 'forkego'), stalo ('ŝtalo'; eble temas pri preseraro), ŝtofo ('materio, substanco'), vaksi ('kreski'), tombi ('fali'). La vortoj ian, kian, nenian, ... en ĉiuj kvin naciaj Unuaj Libroj signifas 'iam, kiam, neniam...'. La ruslingva "Unua Libro" enhavas 947 radikojn, el kiuj 11 estas **propraj nomoj**. Sur la aldonita **folio** ni trovas 917 **radikojn** ordigitajn kaj 10 ekster la **ordo**. **Preserara folieto** donas ankoraŭ 2, sed nuligas la radikon sper. En la **teksto** kaj **titolpaĝo** ni trovas ankoraŭ 19 radikojn. Entute 947.

Vikipedio (la libera enciklopedio)

Lech Wałęsa renkontis junajn esperantistojn en Gdańsk

Renkontiĝo kun la eksa prezidento de Pollando, Lech Wałęsa, estis unu el la pintaj momentoj dum la kvintaga Junulara Esperanto-Semajno, okazinta en Gdańsk ĉirkaŭ la jarŝanĝo. La renkontiĝon kunorganizis Pola Esperanto-Junularo, Germana Esperanto-Junularo kaj la klubo Varsovia vento *. Inter la 170 partoprenantoj el 30 landoj estis ankaŭ Chuck Smith el Berlino. Lia raporto pri la aranĝo, kiun li taksas eksterordinare sukcesa, unue aperis en la angla. La Esperanta versio aperas en Libera Folio laŭ interkonsento kun la aŭtoro.

Saluton el Gdańsk, Pollando, kie okazas la ĉi-jara **Junulara Esperanto-Semajno**(JES) ! Mi devas diri, ke la plej grava manko kiun mi povas mencii, estas ke la aranĝo daŭras nur kvin tagojn, anstataŭ la kutimaj sep... Sed hej, kia bonega kongreso! Jen ni kolektiĝis, 170 homoj el 30 landoj por festi la novan jaron.



Junulara Esperantista Semajno 2011-2012 (JES)

En la unua tago, ni surteriĝis en la flughaveno de Gdańsk, elprenis iom da polaj zlotoj el la bankaŭtomato kaj ekiris al la busoj. La instrukcioj atentigis nin ne elekti certan linion, ĉar tiam necesus atenti pri la ĝusta

direkto de la buso, do ni decidis preni "sekuran alternativon", elektante la buson al la fervoja stacidomo. Post duonhoro ni alvenis. Ho, atendu, estis la malĝusta

direkto. Grrr, do jen ni veturas tutan horon en la mala direkto.

Kiam ni fine alvenis, nin atendis manĝaĵo, kaj ĝi estis tre ĝuinda, krom por miaj amikoj, kiuj miris, ke la kuiristo kredis ke jogurta salatsaŭco estas vegana. Tamen ili rapide anstataŭis la salaton per tiu preparita por la viandomanĝantoj, kiu tute amuze estis vegana! Post la vespermanĝo, la ludejo en la supra etaĝo pleniĝis je homoj ludantaj diversajn tabulajn kaj kartajn ludojn, do mi ĝuis la etoson tie antaŭ ol enlitiĝi.

En la dua tago, rigardante la horaron, mi vidas ke estas malferma ceremonio, kaj poste prelegoj pri strategiaj ludoj, pri la **Piratpartio** kaj pri "plibonigo de la vivo". Ĉar mia propra prezentado ne pretis, mi devis transsalti la solenan malfermon por okupiĝi pri ĝi, sed laŭ tio kion mi aŭdis, la malfermo estis "laŭkutime teda", do mi ne vere sentas, ke mi perdis ion. Impresis min, ke samtempe kun la prezentado pri strategiaj ludoj okazis ankaŭ prelego pri la nova, 24-hora Esperanta radiostacio, Muzaiko. Fakte dum la tuta aranĝo ili havis ĝiĉeton, kie eblis paroli kun la teamo pri la projekto.

Estante ŝatanto de tabulaj ludoj, mi iris al la prelego pri strategiaj ludoj, kie ni estis instruataj pri Hex kaj **LOAo**, kiuj ambaŭ estas bonegaj ludoj. Bona detalo estis, ke la preleganto donis al ĉiuj partoprenantoj paperetojn kaj skribilojn, por ke oni povu provi Hex kun aliaj ĉeestantoj en la ĉambro. Poste mi eksciis, ke nun ekzistas **Esperanta vikio pri ludoj!** Sekve mi devis kuregi al mia propra prelego, kaj surprizis min ke plena ĉambro da homoj volis aŭdi pri la Pirata partio. La projekciilo kaj la laŭtparoliloj, kiujn mi petis, ne estis tie, sed la organizantoj rapide trovis kaj alportis ilin.

La kunveno pri plibonigado de vivo estis vere brila, ĉiuj rakontis pri manieroj kiujn ili uzas por evoluigi siajn efikecon, motiviĝon, feliĉon, menson, korpon kaj finanĉan staton. Poste estis tagmanĝo kaj koncerto de Asorti (litova popolmuzika bando) kaj Gijom (franca kanzonisto kun piano), sed tiuj vere ne estis laŭ mia gusto, do mi simple amikumis kun aliaj nekonzertemuloj dum tiu vespero. La bona afero pri ĉi tiuj grandaj Esperanto-renkontiĝoj estas, ke ĉiam okazas io interesa, sed eĉ se vi volas fari paŭzon de la programo, ĉiam troveblas interesaj homoj de diversaj partoj de la mondo kun kiuj paroli.

En la tria tago, en la mateno, ni havis maloftan ŝancon. Ni havis renkontiĝon kun la eksa prezidento de Pollando, Lech Wałęsa. El la pola interpretis Irek Bobrzak. Wałęsa kunfondis Solidarecon, la unuan sendependan sindikaton en la landoj de la sovetia bloko, kaj li gajnis la Nobelan pacpremion. Ni iom timis, ke iĝos nur monologo, sed ĉefe estis serio de demandoj kaj respondoj, kiun li enkondukis dirante, ke lin plej interesas la akraj demandoj. La demandoj temis pri ĉio ekde demokratio ĝis reformo de kopirajto, la Okupu!-movado, la protestoj en Rusio kaj tiel plu. Estis ankaŭ demandoj pri la rolo kiun havis komunismo en Pollando. Estas tre agrable, ke Esperanto foje donas aliron al tiaj interesaj homoj!



Irek (el Radio « Varsovia Vento ») kaj Lech Wałęsa.

Poste estis [Aligatorejo](#), amuza okazaĵo dum kiu oni ne rajtas paroli sian propran

nacian lingvon nek Esperanton. Tio signifas, ke oni povas tie trafi francon kiu parolas la hispanan al japano kiu respondas germane. Estas amuze por ĉiuj ekzerci lingvojn, dum oni samtempe rimarkas, kial Esperanto estas pli bona solvo por internacia komunikado. Post tio, mi spektis Atakon de la lunaj zombioj, nigra blankan hororfilmon en la stilo de la 1950-aj jaroj, kun Esperanta parolo. Poste mi trafis popoldancantan grupon kiu blokis la koridoron, do mi iris tra sekreta subtera vojo por elveni el la konstruaĵo.

Post la vespermanĝo ni ĝuis bonegan koncerton de [Inicialoj DC](#) de la fama [Berlino sen vi](#), kiun sekvis [Kimo](#) kaj [Danĝera](#). La koncertoj de Inicialoj DC estas ĉiam vidindaj, ĉar li prezentas sian inspiran elektronikan muzikon kun interesaj filmetoj laŭ la stilo de la koncerna kanto en la fono. Kimo kun sia akordeono komencis sian parton de la koncerto kun siaj novaj pecoj kaj poste surprizis nin ĉiujn, invitante la perkut-imitanton [Bugge Bang](#) sur la scenejon. Post mallonga kanto, ili kunludis en io, kion mi neniam atendis vidi: duopo de buŝperkuto kaj akordeono.

Estis bonege! Se iam vi havas ŝancon partopreni iun el ĉi tiuj eŭropaj Esperanto-renkontiĝoj, nepre faru! Estas bonega maniero sperti kulturon el la tuta mondo kaj ekkoni homojn el aliaj landoj. Prefere ol partopreni kurson pri "Kompreni aliajn kulturojn" en via loka komerca instituto, eble indus fari rapidan vojaĝon al Eŭropo por rekte interrilati kun aliaj kaj vidi, kion povas proponi al vi la mondo, en unika ĉirkaŭaĵo!

Ĉu vi iam partoprenis eŭropan junularan aranĝon? Kiaj estis viaj spertoj? Ĉu vi havas konsilojn al aliaj, kiuj partoprenos la unuan fojon? Rakontu en la komentoj!

Chuck Smith

* **Varsovia Vento** : Aŭskultu la lastan eldonon (la 77an) pri JES ! <http://www.podkasto.net>

La Esperantisto de la Jaro

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 proklamon de la *Esperantisto de la Jaro*. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

La unua laŭreato en 1998 iĝis William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste la honoran titolon ricevis



Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ap Fergus (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010)

La Esperantisto de la Jaro 2011 estas **Dennis Keefe** !

En la 2011a jaro 16 kandidatigantoj proponis 19 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis la voĉojn:

Dennis Keefe 12 voĉoj

Hori Yasuo 4 voĉoj

Peter Baláž 3 voĉoj

Stefan MacGill, Perla Martinelli, Floréal Martorell 2 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po 1 voĉon

Dennis Keefe, 60-jara usona instruisto, nun en la universitato en Nankino (Ĉinio), internacie konata iniciatinto de Lingvaj Festivaloj, estas proklamita *la Esperantisto de la Jaro 2011* pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj pro la evoluigo de la projekto "Esperanto-Insulo" en Hajnano.

En la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* aperos intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro 2011.

Elektokomisiono

Proponantoj :

Marija Belošević (Kroatio): vicprezidantino de IKUE

Višnja Branković (Italio): direktoro de Orbis Pictus

Renato Corsetti (Italio): vic-prezidanto de IEF

István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo

Judit Felszeghy (Hungario): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro

Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano

Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU

Aleksander Korĵenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto

Lee Jung-kee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): ĝenerala sekretario de SAT

Bruno Masala (Francio): komitatano de IKUE

Cindy Mc Kee (Usono): reviziisto de La Karavelo kaj respondeculo de verkoj.com

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto

Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro

José Antonio Vergara (Ĉilio): prezidanto de ISAE

Elektantoj :

Petr Chrdle (Ĉeĥio): direktoro de KAVA-PECH

Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE, senatano de la Esperanta Civito

Anna Jausions (Francio): prezidantino de OSIEK

Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista

Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM

Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko

Stano Marček (Slovakio): redaktoro de Esperanto

Tahira Masako (Japanio): estraranino de JEI,

kunlaboranto de KAEM

Geraldo Mattos (Brazilo): doktoro pri lingvistiko

Stefan Maul (Germanio): eksĉefredaktoro de Monato

Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): eksprezidanto de EAF

Roland Rotsaert (Belgio): kasisto de IKEF; redaktoro de Monato pri ekonomio

Martin Schäffer (Meksiko/Germanio): komitatano de UEA, sekretario de GEA

Josef Shemer (Israelo): sekretario kaj estrarano de ELI

Ljubomir Trifončovski (Bulgario): verkisto, redaktoro

Sekretario :

Halina Gorecka (Ruslando): eldonanto de La Ondo de Esperanto



La Alia Paĝo

... Kelkaj Pensoj - Demandoj
- ... Kiuj spegulas nian epokon ...

Kien la nuna ekonomika «krizo» kondukos nin ... ?

Laŭ artikolo el la franca ĵurnalo «*Le Monde*» (M. Rocard, 2a jan. 2012) :
«*Pourquoi faut-il que les Etats payent 600 fois plus que les banques ? (...)*
La Réserve fédérale a secrètement prêté aux banques en difficulté la somme de 1 200 milliards au taux incroyablement bas de 0,01 %. »

Ĉu la ŝuldo estas ... jarcenta prirabado ? ... superregada ilo ?

«Metamorfozo ... aŭ morto» diras Edgar Morin kaj Stéphane Hessel en ilia lasta libro : «*Le Chemin de l'Espérance* (la Pado al Espero)».

La 15an de Septembro, la usona ĵurnalo «*The Wall Street Journal*» titolis «Karl Marx was right» (= Karlo Marks pravis). Iom pli malfrue, George Soros subtenis la movadon «*Occupy Wall Street*» en Usono...

Ekzemploj abundas pri tia kapitalisma disfalo. Ne nur en Usono sed ĉie.

Kio okazas nun ?

Verŝajne, ne ekzistas alia elekto ol elpensi alternativojn.

Ĉu ni dubas plu ?



- Unuflanke ni sentas kaj imagas baldaŭan apokalipson : Ĉie homoj pensas pri fino de nia ekonomika sistemo, kreskanta faŝismo, enlanda aŭ monda milito, ... kaj ne forgesante verŝajnan ekologian katastrofon.

- Aliflanke ĉio kio ŝajnis antaŭ nelonge neimagebla iĝas pens-neceso.

Ankaŭ, momento estas por eksperimenti novajn vivmanierojn, deklari novajn rajtojn, skribi novajn konstituciojn.

Ĉu ni kune partoprenos tiujn projektojn ? ... Aŭ ĉu ni jam akceptis teruran malvenkon ?

Laboristoj, senlaboruloj, junaj, maljunaj, eŭropanoj, ekstereŭropanoj, etnaj aŭ religiaj minoritatoj, emeritoj, handikapuloj, ... Ĉu ili estas problemoj ? ... aŭ solvo ?

Ĉu ni preterpasus kapitalismon ?

Esperanto adaptiĝus perfekte al pli - bona, justa, sociala, natur-respekta mondo...

Ĉu ? ;-))

Laur'



Novjara renkontiĝo en Bitburg (Germanio)



Zamenhofs Festo en... Bruselo !



Zam-Festo (Sekvo)



Jarfina festeno en Grezijono (Francio)

